



EKO 2015-6 sendita al 4an de marto

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, listoj kaj unuopuloj.

Ni dankas al la donacintoj al AMO 7!

Ni kore, eĉ se iom malfrue, dankas al la personoj, kiuj donacis specife al la AMO-seminario en Togo ludo fine de 2014. Pluraj donacoj venis en Korea Respubliko, dank' al la aktiveco de mia estrara kolego Lee Junkee. La kolektita mono faciligis la alvenon de pluraj el la partoprenintoj el aliaj afrikaj landoj. Donacoj estas daŭre bonvenaj por la AMO-programo; se vi mencias specifan seminarion aŭ kontinenton, ni respektos tion. Sendu donacojn al la Centra Oficejo kun indiko 'AMO-programo'. Antaŭdankon!

Kontinenta migro

Ne temas pri la geologia fenomeno, sed eta rearanĝo de la estraranoj de UEA respondecaj por la regionoj. Lee Jungkee transprenis de Stefan MacGill respondecon pri Afriko, kaj ekagis pri tio. Tiu lasta akceptis respondecon pri la regiono MONA (Mezoriento kaj NordAfriko), ĉar li partoprenos en la 8a MEK.

La 8a Mezorianta Kunveno (MK)

Okazos en Hamameto, Tunizio ekde la 28an de marto – aliĝoj jam kreskis ĝis 65 personoj! Ili venas el 15 landoj, 8 el Eŭropo kaj 5 en la MONA-regiono.

Informoj: <http://esperantomovado.blogspot.hu/2014/08/8-mezorienta-esperanto-kunveno.html>

AMO-10 en Brusono, ĉiu IJFonto bonvenas

Ni raportis pri tio al vi en komuniko 2015/5 kune kun la traktotaj temoj. Ni volas nun aldoni nur, ke partopreno en tiu seminario estas **malferma al ĉiu ajn aliĝinto al la IJF** (Internacia Junulara Festivalo). Restas la deziro trejni trejnistojn – jamajn aŭ potencialajn – sed tio ne estas la ĉefa celo de la nuna seminario. Iam estonte, ni ja organizos seminarion kun specife tiu celo.

Okaze de la estrarkunsido de TEJO ĉi-semajnfine certe pliaj detaloj estos deciditaj – tuj ni plukomunikos ilin, kune kun raporto pri tiu kunsidado. Informoj pri IJF: (<http://iej.esperanto.it/ijf/?lang=eo>);

Enketilo al Landaj Asocioj disiris

Malfrue en la 28a de februaro disiris ses-paĝa demandilo al la Landaj Asocioj listigitaj en Jarlibro 2014 (aliĝintaj kaj ne) cele al akiro de pli kompleta bildo pri iliaj agadoj en 2014 kaj planoj por 2015. La resenda limdato estas la 30a de aprilo 2015, ekde kiam ni ekkompilos la rezultojn kaj publikigos ilin. Aldone al bazaj informoj, la enketilo havis apartajn sekciojn pri retejoj kaj retuzo, pri Vikipedio, pri ĝemelaj urboj, enlandaj rilatoj kun Unesko kaj faka agado ene de la lando. Ni regule raportos, kiom da LA respondis, kaj kiuj. Simila, sed malpli longa enketilo estas pretigota por la Fakaj Asocioj.

Ene de la lastaj 12 horoj alvenis jam tri respondoj: en Taĝikio, Bulgario kaj Venezuelo. Gratulon al ili!

SE VI festos la Virinan Tagon – do, SEVI

Ĵus finiĝis SEVI, la dua SEminario por Virinoj en Kotonuo, Benino, kun temoj: Kapabligo de virinoj en gvidaj roloj kaj 'Unua Kontakto kun Esperanto'. Plie okazis legado kaj skribado de la fonua lingvo, ĉefa benina lingvo. Temis pri plena semajno en formo de studcela kunloĝado. Partoprenis 15 virinoj en la aĝo de 21 ĝis 29, ĉiuj en supera studado aŭ finintaj ĝin. ILEI kontribuis al ĝia sukcesa realigo.

Sinjoro Zossou, direktoro de la ŝtata oficejo pri lokaj lingvoj vizitis la seminarion kun diversaj libroj en la fonua lingvo en sufiĉa kvanto por ĉiuj.



Gvidantoj estis: Privas Tchikpe kaj Mirejo Grosjean pri «virinoj en gvidaj roloj», Christophe Hounto-Ada, instruisto pri alfabetigo en la fonua lingvo kaj Ladislav Tande kiel kunordiganto.

La partoprenantinoj trapasis ekzamenon laŭ la programo «Unua Kontakto»; 14 sukcesis kaj ricevis atestilon. Fotoj de la aranĝo (proks 80) vidiĝas tie :

<http://mirejo3.blogspot.com/2015/02/sevi-cotonou-benin.html>

La gvidaj organoj de la asocio 'Scio Sen Bariloj' antaŭvidas okazigon de tia evento unufoje jare, aŭ pli...
La UEA-konto de « Scio Sen Bariloj » estas assb-k.

Pretigita laŭ komuniko de Mirejo Grosjean, prezidanto de ILEI.

Oficialaj lernejoj Esperanto-kursoj en Herzberg am Harz

Baza lernejo 'Nicolaj': 6-9-jaraj lernantoj lernas Esperanton en 60-minuta posttagmeza fakultativa kurso laŭ permeso de la federacilanda edukministerio de Malsupra Saksio.

Meza lernejo 'Oberschule': 10-18 jaraj lernantoj. Esperanto estas libere elektebla fakrondo (unufoje 45 minutoj/semajno).

Gimnazio 'Ernst-Moritz-Arndt': 10-18-jaraj lernantoj lernas Esperanton en 2x45-minuta posttagmeza kurso, kiu same okazas laŭ la permeso de la federacilanda edukministerio.

La Gimnazio kaj la Esperanto-Societo Südharz subskribis kontrakton kaj fariĝis kunlaborantaj partneroj por plenumi Esperanto-instruadon. La kursojn gvidas Zsófia Kóródy (oficiala anstataŭanto estas Peter Zilvar). En ĉiuj lernejoj murtabuloj, afiŝoj, faldfolioj informas pri Esperanto.

Foto ĉe http://esperanto-urbo.de/blog.php?blog_id=64491765

Nia Azia Komisiono raportis pri 2014

La Azia komisiono de UEA (KAEM) pretigis sian jarraporton por la pasinta jaro. Ni alkroĉas ĝin en PDF-dokumento unupaĝa.

Estraro raportis al la Komitato

La Komitato rezoluciis en Bonaero, ke la Estraro raportu al ili regule (ĉiumonate) laŭ la modelo de TEJO. Jen la raporto liverita fine de februaro. Ĝi estas publika dokumento, kaj efektive legebla de iu ajn en la dokumentejo de la komitata grupo. Tamen, mi sendas ĝin al vi eksplicite (sed ne al Komitatanoj, kiu jam ricevis ĝin).

La Estraro kunsidis skajpe la 7an kaj 21an de februaro, kaj ankaŭ dum duona horo antaŭ kunsido de la Konsilio la 28an de februaro. La mastruma teamo (MF, MS, SMG) krome kunsidis la 4an de februaro.

La roterdama kunsido de la Estraro okazos de la 23a ĝis la 26a de aprilo 2015. La 25a estos Malferma Tago en la Centra Oficejo.

Estrara raporto 2014: skemo estas pretigita, la celo estas finverki la raporton ĝis la fino de marto.

Nova ĜD: anonco aperos en la marta Revuo *Esperanto*, kaj pli detala postenpriskribo estas afiŝita ĉe uea.org. La anonco aperos ankaŭ anglalingve, informcele, ĉe kelkaj retejoj de internaciaj organizaĵoj.

Buĝeto 2016 por Movada Evoluigo: la Estraro celas kreskigi tiun ĉi parton de la buĝeto jaron post jaro. Detala propono por tiu buĝetero estas diskutita en la Estraro kaj Konsilio, kaj estos traktata kadre de la buĝetaj preparoj antaŭ kaj dum la roterdama kunsido.

Retejaj novigoj: la UEA-vikio estas nun rearanĝita kaj prilaborata de la Estraro por respondi al la agaddirektoj de la Strategia Laborplano kaj provizi ĝisdatajn informojn pri la agadoj sur ĉiuj kampoj.

Novaj Landaj Asocioj: la Estraro kreis laborgrupon (JAV, LJK, SK) por pristudi la demandon, kiel plej bone subteni kaj gvidi novajn landajn asociojn kiu pretiĝas por aliĝo al UEA.

Komitata reta voĉdonado: sistemo bazita sur tiu de TEJO estas testita de kelkaj estraranoj kaj konsilianoj, kaj aprobita por elprovado ĉe la Komitato mem, post lokigo en reta servilo de UEA. Verkiĝos eta gvidilo pri la uzo de la sistemo.

UK Lillo: BP partoprenis la kunsidon de LKK en Parizo la 14an kaj 15an de februaro, kaj poste raportis detale pri la evoluo de la laboroj. Ĝenerale la preparoj tre bone antaŭeniras, kun tre riĉaj kultura kaj kleriga programoj inkluzive de rekorde granda proponaro por IKU (la Estraro esploras la eblecon okazigi ankaŭ Sciencan Kafejon). Jam de la jarkomenco, la Estraro okupiĝas pri aranĝoj por certigi ke kelkaj afrikanoj povos partopreni la kongreson. La prezidanto kaj sekretario de LKK venos al la roterdama kunsido en aprilo por kuntrakti diversajn detalojn kun la Estraro.

UK Nitra: la Estraro aprobis la konsiston de LKK, kun prezidanto Peter Balaž, kiu same venos al la roterdama kunsido por jam frue konsiliĝi pri gravaj trajtoj de la Nitra UK.

UK 2017: venis invitoj de Montrealo kaj Seulo, kaj MS faris esplorviziton kun la Kongresa Sekretario al ambaŭ urboj; la estraro nun atendas detalan tabelan komparon de la du invitoj por povi fari decidon.

Tagoj de radio kaj gepatra lingvo: sub la zorgo de SK, kolektiĝis kaj dissendiĝis diverslingvaj materialoj pri ambaŭ tagoj, substrekante la signifon kiun ili havas por esperantistoj: <http://www.linguistic-rights.org/unesco/> kaj <http://www.linguistic-rights.org/21-02-2015/>.

Ekonomia justeco: okazis diskutoj en la Estraro kaj Konsilio pri la kotizsistemo (membriĝoj kaj kongresaliĝoj), kiu ne plene respondas al la vastaj ekonomiaj diferencoj inter landoj kaj ankaŭ la socitavoloj ene de difinita lando; la Estraro proponas al la Komitato starigi komisionon por esplori pri la sistemoj uzataj de aliaj internaciaj organizoj, por taksu la eblecon pli juste aranĝi la kotizojn en UEA.



Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.